



Mondcivitano

2-A ELDONO 1-A JARO MAJO-JUNIO 2005

Ĉefartikolo

Saluton al ĉiuj. Ni estas nun en nia dua eldono, jam zorgante pri la venonta kiu ne nur estos rete sed ankaŭ papere.

Ĉi eldone ni parolas iomete pri la Ŝipa Promenado Marborde de Fortaleza, kiu okazis aprile kaj kompreneble pri la ĉijara BK, kiu okazos en Porto Alegre – RS, tre bela urbo de nia vasta kaj ampleksa lando.

Certe ni ne povus diri nenion pri la Picumado-Tago. Malgraŭ la picumadan tradicio ne estas nordorienta sed centrsuda, la gefortalezanaj esperantistoj multŝatas rekontiĝi en granda rondo por picumi kaj babilu. Pro tio ni ankaŭ festos tiun tagon kaj rilatos iomete pri ĝia historio.

La muzikon kiun ni kunportas ĉifoje estas por kelkaj el vi memoraĵo de la bela pupteatra prezentado en Macejoo.

Ni esperas vi ĝuu.

Kore,
La Eldonantoj

AGENDO 2005

Julio

10-a – Picumado-Tago

18 -23-a – **40-a BKE** Porto Alegre-
RS, Brazilo

23 -30-a – **90-a UKE** Vilno, Litovio

Por pli informoj, bv kontaktu nin per la retadreso:

mondcivilaneco@yahoo.com.br

aŭ per la

poŝtelefonnumero:

(55 85) 99513955



40-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

TUTMONDIĜO KAJ FRATECO

Enirvojo al la turismaj lokoj de Sud-Riogrande, Porto Alegre ricevos tiu jaro la partoprenantoj de la 40-a Brazila Kongreso de Esperanto kies temo estas “tutmondiĝo kaj frateco”. De la 19-a ĝis la 23-a de julio, oni povos kvankam discuti tiun interesan kaj necesan temon, konatiĝi kun historiaj kaj kulturaj lokoj de la kongresurbon kaj tiel ekkoni ĝin.

Ĝeneralaj informoj pri la ĉijara kongreso estas konsulteblaj ĉe la TTT-ejo: <http://www.lujz.org/bke/>.

En la Kongreso eblos fari multajn esperantajn kursojn, partopreni laborkunsidojn kaj amuziĝi.

Estos gvidotaj Cseh-metodaj kursoj, Baza Cseh-metoda kurso, Meznivela Cseh-metoda kurso (tia unuafoje en la kongreso). Ilia kursgvidantino estos MiMa (Neusa Priscotin Mendes), spertulino en tiu metodo. Kvankam estos senditaj senpagajn Kurson de Esperanto (1) - gvidota de Jair Salles; Kurson por instruistoj – gvidota de S-ro Pedro J. Cavalheiro; kaj Didaktikan kurson – gvidota de S-ino Julinha Z. Feijó Pereira.

En la programo ni ankaŭ trovas Fakkunsidon de Asocio Oomoto (pri kiu respondos S-ro Yasuhara Fujimoto); Konversacian rondon (respondota de S-ro Ademar Vieira Diniz) celante la praktikadon de la lingvo pere de anekdotoj, kvizoj kaj aliaj rimedoj; Konversacian rondon “Ni ludu kune” (S-ro César Dorneles).

Kunsido de Nordorientaj E-Asocioj ankaŭ okazos tie kaj pri ĝia organizado respondos S-ro Wandemberg Ribeiro. Tia kunsido estos la daŭrigado de la diskutoj ekfaritaj dum la Laborkunsido de la Nordorientanoj kiu okazis junie en Natalo – Nord-Riogrande.

Interfrata renkontiĝo de virtualaj geamikoj organizota de S-ino Lúcia Marder (Karesema) kaj celante kunveni la geamikaron kiu ofte babilas per la interreto ankaŭ okazos kadre de la 40-a BK.

Kaj por amuziĝi la homoj, la kongreson enkadros la Kvizo-ludo “Show do Milhão” (S-ro Ivaldo Alves de Souza).

Cetere estas programitaj diverstemaj prelegoj.

La **Artaj Aranĝoj okazos la 20a de Julio kaj la 21a de Julio**. Tie faros Kunkantadon kaj deklamadon S-ro Jorge das Neves kaj Poetino Neide Barros Reĝo.

Por la gejunuloj, okazos la 25^a Brazila Esperantista Junulara Kongreso. Enkadre estas jam programitaj prelegojn kaj diskutrondojn, ludojn kaj ekskursojn, interese gajn filmojn, de la tuta mondo, kun subtekstoj en Esperanto kaj aliajn bonegajn amuziĝojn

En La Bankedo, kiu okazos la 22-an de julio, POA-e ne povus manki ĉuraskon. Ĝi okazos en “Ĉuraskejo Roda de Carreta (Ĉaro-rado)”, apud “CTG 35 (Centro de Tradições Gaúchas/Centro de Gaúĉaj Tradiĉoj)”. Dum la manĝo gaŭĉa grupo nacikonata oferos folkloriĉan spektaklon kaj muzikaĵojn. Eblos danci en la loko.

Muziko



Flor' de Pupteatro (Flor do Mamulengo*)

Luiz Fidelis

(Esperantigo: Tarcisio Lima)

Eltola flor' de pupteatro,
Mi revas pri teatrpupeto,
Sed ve ĝi prete senrevigas min,
Prete senrevigas min,
Prete senrevigas min,
Jes, preteprete.

Nervas en mi la drapoj drame,
Ĉar ĝin misame mi daŭras pete
Kaj ve ĝi prete senrevigas min,
Prete senrevigas min,
Prete senrevigas min,
Jes, preteprete.

Se vi teatre min ne amos, ek!
Mi ĉifonigos vin pro tiu pek'!
Mi ne eltenas plu sen via varmo,
Pipeta cxarmo

Se ve ĝi prete senrevigas min,
Prete senrevigas min,
Prete senrevigas min,
Jes, preteprete.

Mamulengo: virpupo farita el drapo kaj manipulita de iu.

LA VORTO MALFERMAS VOJON

La vorto estas grava doto ki oni ricevis de la kreanto.
Ofte uzinta je la homaro ekde la komenco de la la civilizacio, ĝi ĉiam estis temo konstante studita.

La studentoj pri idiomoj dediĉas grandas parton de sia tempo esplorante por plibonigi la lingvojn.

Amaso da komunikiloj dronigis, ĉefe en la labirinto de la gramatiko.

Gravuloj de la mondo, obstine, daŭras malpermesante vojaĝojn, interŝanĝojn kaj negocojn, entreprenojn ktp.

Se vi volas koni multajn da landoj, vi devas lerni multajn da lingvojn.

La mondo estus pli bona se ĉiuj uzus unu lingvon neŭtralan internacian.

Kelkaj konfliktoj ne okazos ĝis malsimilaj ideoj de la internacia penso, em la horo de ldecido estus okazo por interfatiĝo, respektano unu la aliaj.

La propono de Zamenhof solidigis en la 16-a reguloj ĝi montras la intencon de malfermi landimo kaj doni al ĉiuj oprtuneco por iri tra la mondo sen lingva obstaklo.

La e-movado estas homa kaj frata ago.

S-ro Antônio Bezerra

Fortaleza, 12/03/05

Internacia Pico-Tago

Respondecula pri la sektoro kiu pli kreskas ekonomie kaj kiu generas pli da laborojn, la pico havas memorigan mondtagon.

La 10-a julio, la mondo festas la Internacia Pico-Tago, la dua pli vendita manĝaĵo monde – la unua estas la hakviando.

Brazile, la konsumado de pico atingas 43 milionoj monate. Ronaldo Ayres, konata kiel *Senhor Pizza*, reliefigas ke, malgraŭ la pico estas unu el la produktoj la plej konsumitaj, oni havas kelkajn problemojn kiujn povas endanĝerigi sian kreskadon merkate.

La urbo San-Paŭlo, ekzemple, havas 6000 picejon, malgraŭ nur 50% estas leĝigitaj.

Estas 6000 picejoj elprenante de siaj fornoj 43 milionoj monate, nur San-Paŭlon.

Tie tiu dato estis kreita ekde 20 jaroj antaŭe. Estas grava dato por la urbo kies la picadorliniĝeco havas similaj nur en Buenos-Ajreso, en Nov-Jorko kaj, kompreneble, en Napolo.



Fortaleza Marborda Velŝipa Promenado

La 17-a de Aprilo, bela dimanĉo kien la suno brilis kaj la maro trankviliĝis, la geesperantistoj el Fortaleza havis la eblecon fari kune belan velŝipan promenadon tra la urba marbordo.

La rekontiĝo estis je la 9-a horo matene cxe la Iracema Statuo. De la grupo partoprenis diversjaraĝaj personoj ene vera esperanta etoso. La gvidanto estis kapitano Anildo kaj la velŝipo, kiel ĉiuj ŝipoj havis nomon. Ĝi nomiĝis Philosophie. Kompreneble, ĉi foje oni ne povis esperantnomigi la ŝipon sed Roberto (la vendisto) kaj lia esperantisteco ne povus lasi manki la esperantistaĵojn kaj kompreneble inter ili la belan verdan flagon kiun akompanis nin svigante maste tra tuta la itinero.



Plaĝe de Mukuripeo oni enŝipiĝi. Unue la velŝipo iris al la orienta flanko kie estis vidata la porto kaj la ŝipoj. Ĉi momente, vidante la maron kaj sintante la mara balanco la poeteco plenigis la animon de Vandembergo kiu aŭdindigis kiuj estis tie kun bela omaĝo al José de Alencar, cearaano verkisto de la bela romano Iracema. Li per kore deklamis kortuŝanteblan parton de la verkaĵo.

Kiam oni preskaŭ atingis la Kvietan Plaĝon (Praia Mansa), la ŝipo staris por ke oni rajtus marbaniĝi. La etoso estis bona. Kelkaj malsuprenis saltante aŭ ŝtuparante, aliaj preferis resti ferdeke profitante la sunvarmecon, la ombbron kaj la kokoso-akvon aŭ iun refreŝigaĵon.

Post la halto, la velŝipo turnis kaj iris ĝis la alia flanko. La vento akompanis la promenadon tuŝante la vizaĝojn mirindigitajn de kiuj ne ĉiam havas la tempon vidi la belecon de sia propra urbo.

La tiamajn malproksimajn hotelojn, la alian Iracema-n Statuon, la anguletojn kiel alitempe troviĝis la fortelezbohemon, la du pontojn, la de la angloj kaj la metalikan, sopirigis.

Revenante do, oni elŝipiĝis en la sama loko, kie atendis la grupon, la indiĝenaj kaj esperantistemaj okuloj de Iracema rigardante la maron, kaj oni kunportis hejme la bonan esperantan etoson kiun ĉiam akompanas tiuj kiuj ŝatas fratiĝi irante ie ajn.



Damiana Britto

J U N I A F E S T O

La I Junia Festo Fortaleza okazis la 18-a Junio ekde la 20-a horo en spaco disponigita de Rita. Kiu iris al la festo profitis agrablan etoson, manĝis, drinkis, partoprenis hazardlotadon, aŭdis kaj dancis "forro"-on kaj juniajn muzikojn, improvize dancis la tradician "quadrilha"-on kaj vidis belan kaj amuzan improvizan teatraĵon kies Prof-ro Paŭlo Amorim kaj lia edzino estis la brilantaj steloj.

Ili estis la amuzega gefianĉoj. Carvalho scenis la pastron kiun ne estis pastro sed sakristiano anstataŭigante la veran pastron, kiun multe drinkis. Li preskaŭ devigis la gefianĉojn edziĝi. Li ne sukcesis faris tion ĉar unue la gepatroj ne volus la edziĝon pro de juneco de iliaj infanoj kaj poste ĉar antaŭe la fianĉo volonte diris ke li ŝanĝis ideon kaj edziĝus la gracion gravedan junulinon kiu jaraĝis nur iom pli ol 50.

La improviza "quadrilha"-o ankaŭ multe plezurigis. Carvalho gvidis la aferon kiu preskaŭ ĉiam bone funkciis. La eraroj kaj la imitaĉoj dum la geamantoj promenadoj, kelkaj paroj kiuj vere estis trioj pro de la infanojn, la amuzkrioj kaj la ridigaj geamantoj amuzegis ĉiujn, kiuj feliĉe kaj lace ĝisis fine de la afero.

Cetere la festo helpis la konstruadon de la definitiva sidejo de CEA (Cearaa Esperanta Asocio) pere la vendaĵo de la enirbiletojn kaj de aliajn aferojn kiujn estis disponigeblajn loke. Nome de estraro de CEA ni multe dankas al ĉiuj kiuj pro de ilia laboro donacante ion aŭ helpante en la organizado de la festo atestis la veran ekzistadon de la paca faj frateca esperanta kulturo.

Ligoj

www.imagu.uaivit.com.br
Paĝaro de la filmo Gerda Malaperis

www.esperanto.lt/uk2005/
Paĝaro de la 90-a UKE en Vilno, Litovio

www.tejo.org/ijk/2005/cxefa.php
Paĝaro de la IJK en Zakopane, Pollando

www.esperantoceara.org.br
Cearaa Esperanta Asocio

http://www.lujz.org/bke/
BKE 2005 – Porto Alegre

Libroj

Alencar, José de. Iracema: Legendo pri Cearao. Fortaleza: UFC, 1997

Aro:

Ĉefartikolo: Damiana

Diagramado : Ligia Taillade

Retigo: Wesley kaj Golbery (Gouberjo)

Ni aldankas :

S-ro Antônio Bezerra

Candelária kaj Danni Motta (Muziko)

Valmir Jr. (Fotis dum la Ŝipa Promenado)




Ludoj



KRUC-VORTENIGMO

Malkrovu la esperantigitan nomon de juna cearaa esperantisto.

- 1 heroino kies historio estas mondkonata kaj uzata kiel propedeŭtica materialo.
- 2 Unua nomo de la persono el Minaĝerajso kiu filmos tiu historio
- 3 Se vi faras ion kion alia persono faras, vi faras _____ tion.
- 4 Edukitaj homoj diras tiun adverbbon, kiam ili petas ion.
- 5 Retrevuo por junuloj. Ĝi estas farita de koreaj, ĉinaj, francaj ktp junuloj kaj havas partoprenojn de diverslandaj uloj.
- 6 Kiam ĵurnalisto volas scii pri gravulo li povas fari tion
- 7 Tutmonda Junulara Organizo
- 8 En tiu lando okazos la venontjara UK



* La respondsilosilo estos en la venonta eldono